KRITIKO – NE DANKON ! ?
Kial radikala kritiko de la Esperanto-movado necesas

Kutime, kritiko estas ligita kun la pedanta mallaŭdo pro iuj bagateloj – en la profesia ĉiutago kaze de dungito, kiu malfruis je kvin minutoj aŭ faris eraron en letero aŭ fuŝtajpis la retadreson ktp., en la armeo se la kravato ne estas korekte bindita, se la hararo tro longas malantaŭ la oreloj aŭ se la saluto al oficiro ne sekvis ĝustatempe. Do, kritiko ĝenerale implicas ion esence negativan. Kritikitoj pro tio povas fariĝi tre frustritaj, perdi sian laboremon kaj lojalecon kaj eĉ ekmalŝati aliajn homojn. En la moderna labormerkata psikologio oni parolas pri mobingo. Mobingaj formoj estas plurfacetaj, kaj ili funkcias praktike ĉie, cetere ankaŭ en la privata vivo.
La lastatempa sperto kun kritikado de pridubindaj kaj eble plibonigindaj ekzistaĵoj sur diversaj niveloj kaj terenoj en la Esperanto-movado (fare de la subskribanto) instigis min verki ĉi tiun artikolon pri la temo ‚kritiko'. Por ricevi ilian opinion pri la temo, ilian klarigon de la fenomeno, mi konsultis plurajn elstarajn esperantistojn de diversaj etnaj kulturoj. Jen kelkaj konkludoj.

Kritikado en volontula kaj amatora medioj

En la Esperanto-movado, organizo profunde volontula, honorofica, amatoreca kaj hobiisma-klubeca (kio en si mem estas nenio malbona), do malprofesia, heterogena, nekohera, inerta, tendence anarkieca, propagandisma, ĉiu estas bonvena kunlabori, eĉ gvidi, verki kaj prelegi, sendepende de la faka kompetenteco, se la prezo estas senpaga. Konkurenco preskaŭ ne ekzistas (kaj ofte nedeziratas)[1], kontrolo de la laborkvalito same forestas (kun kelkaj malmultaj esceptoj en profesieca ĉirkaŭaĵo), la rezervujo de ideoj kaj aplikoj, ĉu taŭgaj aŭ ne, estas neniam plena. Ĉiu kontribuas laŭ siaj ebloj kaj manieroj, respondecante pri sia propra produkto, fervore propagandata, sendepende de ĝia kvalito kaj sencohavo. Oni alte tenas la idealon de kunlaborado, kiu en la praktikado estas tre malfacile efektivigebla, ĉar multaj izolite agantaj aktivuloj veturas propran trajneton. Kritiko ‚ad rem' estas kutime perceptata – kaj rifuzata – kiel kritiko ‚ad hominem'; el kritiko povas naskiĝi akraj konfliktoj kaj kvereloj ĝis reciproka bojkotado de la agado kaj agantoj. En la Esperanto-movado kritiko kaj kvereloj havas longan tradicion, ekde la zamenhofa tempo.[2] Kiom da vana energio estis perdita en tiuj konfliktoj! Estas eĉ malfacile diri, ĉu tiuj konfliktoj solvis ion ajn en la movado. Pruvi aŭ malpruvi tion estas nefacile. En multaj kazoj eblas dubi, do ili estis vanaj.[3]

[1] Aliflanke, necesas ankaŭ konstati, ke en la Esperanto-movado estas sufiĉe malfacile surmerkatigi novajn senkonkurencajn produktojn.
[2] Ni pensu ekzemple pri la lingvaj reformdiskutoj en 1891-94 kaj denove ekde 1907 (Ido-skismo) aŭ pri la disputoj pri la homaranismo de L.L. Zamenhof. Aliaj elstaraj ekzemploj estas la skismo inter la neŭtrala kaj SAT-movadoj en la 20aj jaroj, aŭ la UEA-IEL-krizo inter 1936 kaj 1947, aŭ la historio kun Ivo Lapenna kun kulmino en 1974, ktp. Pri senĉesaj kvereloj en Landaj Asocioj ni tute ne parolu.
[3] Eble tamen ne la fondo de UEA en 1908.

Elstara planlingvisto svisa komparis Esperanton kun religio, la Esperanto-movadon kun ordeno. Itala samideano, kiu korespondis kun mi ĉi-teme, konfirme atribuis al la Esperanto-movado la trajtojn religi-surogata, heroema, martireca, simbol-muela, idolana. Kiel ajn oni ece karakterizu ĝin, la Esperanto-movado estas relative malgranda movado (tio estas grava paradokso konsidere ĝiajn universalismajn ambiciojn). La esperantistoj investis amason da tempo kaj energio en lernado kaj praktikado de la lingvo. Ofte ili multe laboras por Esperanto, sen kompenso. Subkonscie ili do atendas, ke iliaj kolegoj rekonu tiujn faktojn. Ni ofte fuŝas, sed ne volas aperi antaŭ la aliaj esperantistoj kiel fuŝuloj. Sekve ni estas sentemaj pri kritikado. Ĉi tiujn frazojn skribis al mi konata usona esperantisto kun longa movada sperto, kiun mi petis opinii pri la temo kritiko.

Lerni el eraroj kaj fuŝoj

Fuŝoj, misoj kaj eraroj, kiel normalaj akompanantoj de la homa laborado, en si mem ne estus tioma tragedio, se poste oni volus kaj povus eviti ilin. Multe pli grava kaj pensiga estas la fakto, ke kritiko kaj memkritiko en la Esperanto-movado tro ofte ne trafas al fekunda tero, ke (severajn) kritikantojn oni konsideras stranguloj, herezuloj kaj nest-malpurigantoj, fojfoje aĉuloj, mensoguloj kaj mensmalsanuloj. Mi mem spertis tion. Memlaŭdado, singlorigo kaj sinpravigo anstataŭ kritiko kaj memkritiko certe kontribuas al la kialoj, kial la Esperanto-movado vere ne progresas, ne povas progresi. Ĉi tiu situacio, kiu ja ne estas tipa ekskluzive por la Esperanto-movado, estus analizinda far la sociologio, psikologio kaj patologio-psikiatrio.[4] Nature ni ne konkludu, ke en la Esperanto-movado ekzistas nur fuŝuloj kaj mallertuloj, ĉar ni bone scias, ke ekzistas pruveble elstaraj agad-rezultoj de amatoroj kaj volontuloj (kiuj ofte estas samtempe seriozaj profesiuloj-fakuloj-kompetentuloj). Sed ne tio estas nia temo.
Kio estu kritikata - aŭ kritikebla - en la Esperanto-movado? Principe ĉio, kio estas kritikinda kaj kritikenda, kiel konfirmis la konsultitoj. Kaj kiu rajtas kritiki? Precipe ĉiu, kiu deziras esprimi kritikon kaj kiu estas kompetenta aŭ sentas sin tia. La celo de ĉiu kritiko ja estas aŭ devus esti, ke ĝi estu aŭdata kaj ke ĝi havu efikon. Rajtas kritiki tiu kiu povas klare difini la kriteriojn kaj celojn, kaj tiu kiu povas klare analizi, ke la celojn oni ial ne atingis/as, sed ja povus atingi per aliaj rimedoj, kiel instruis min esperantisto el Nederlando.

Kion do kritiki ?

Laŭ klasika difino ‚kritiko' signifas en ĝenerala senco ekzamenan prijuĝadon laŭ pravigeblaj normoj por pritaksi la valoron aŭ malvaloron de iu aĵo aŭ afero, aŭ persono. Ekzistas diversaj kvalitaj specoj de kritiko, ĉefe jenaj:
- pozitiva kritiko, t.e. laŭdo, agnosko, admiro
- negativa kritiko, t.e. mallaŭdo, rifuzo, kondamno
- konstrua kritiko, t.e. kritiko, kiu celas plibonigi iun (mis)staton

[4] Ĉi-rilate iom da laboro estas farata ekzemple de Esperanto en perspektivo (1974), Forster (1982), Leyk (1984), Rašić (1994), Carlevaro (1994-96), k.a.

- detrua kritiko, t.e. kritiko, kiu celas neniigi aĵon, aferon aŭ personon
- memkritiko, t.e. prijuĝo de la propra sinteno, agado, laboro

Unu el la konsultitoj respondis, ke ja eblus kritiki seke-serioze (severe), sed ankaŭ ironie-pike, depende de la kritikindaĵo. Ne ekzistus unusola taŭga kritikmetodo. Plej gravus, ke la kritiko baziĝu sur faktoj kaj ke ĝi estu klare esprimita, mi aldonus: neŭtrale, objektive.

Konkretaj kazoj

Por ne resti abstrakta, kritiki en la Esperanto-movado per tiu aŭ alia metodo oni povas plej diversajn aferojn: ekzemple la ĝeneralan strategion de la Esperanto-movado[5] aŭ la neobjektivan prezenton de Esperanto en fanfarona stilo kaj fantazia maniero, aŭ la malaltan nivelon de iuj Esperanto-aranĝoj aŭ parton de la programo de Universala Kongreso, la malbonan Esperanto-lingvouzadon de iuj samideanoj propagandantaj nian lingvon,[6] aŭ la mankon de interesaj kaj altnivelaj artikoloj en movadaj ĉefperiodaĵoj. Eblas pridisputi unuopajn doktrinojn kaj agadojn kiel ekzemple la tiel nomatan raŭmismon aŭ la Esperantan Civiton kun ties konsuloj kaj senatanoj[7] same kiel aliajn blufaĵojn, kiuj abundas en la Esperanto-movado, kiel la akademiaj titoloj de AIS, aŭ la Manifeston de Prago kun ties pseŭdosciencaj trajtoj kaj integraj kontraŭdiroj.[8] Sur alia nivelo de kritikado eblas pridubi la ĝeneralan kvaliton de la Esperanta Vikipedio, kies reputacio riskos esti malbona, se ĝi restos eterna konstruejo kun gigantega nombro da nefidindaj kaj nekompletaj informoj.[9] Negative recenzi oni povas iujn fuŝajn vortarojn aŭ lernolibrojn didaktike ne sufiĉe elpruvitajn. Aliaj kritikoj povas koncerni la teknikan nefunkciadon de iuj asociaj organoj aŭ malbone organizitan ekskurson, jarkunvenon, prelegon, ktp.; kutime ĉi tiu kritiko estas ligita kun la mallaŭdo de unuopaj personoj, kiuj malbone funkcias malgraŭ siaj respondecoj, ktp. Do la spektro por kritikado estas varia kaj vasta. Nature, ofte la kritiko riskas fariĝi subjektiva, ĉar ĉiam ekzistas ankaŭ la alia flanko de la medalo, la alia percepto de la aferoj. Kion iu trovas malbona, alia trovas bona, kaj inverse.
En la Esperanto-movado funkcias ankaŭ pli subtilaj formoj de kritikado, esprimata ekzemple en prilibraj recenzoj, en kiuj kritiko povas terure ofendi la koncernatojn, kiuj kredas, ke la kritiko estas maljusta. Multaj kazoj estas konataj, kelkaj el niaj intelektaj komunumanoj perfekte regas tiun arton de pika recenzado, polemikado kaj pamfletado.[10]

[5] La kritiko pri UEA flanke de la Esperanta Civito jam estas bone konata.
[6] Ekzemple la forgeson de akuzativo.
[7] Reprezente vd. la kritikon de Detlev Blanke: Ĉu manifesti kaj civiti? (2000).
[8] vd. ekzemple la kritikon de Christopher Culver (2005).
[9] vd. ekzemple la kritikon de Niko Kalivoda en Ipernity (2008).
[10] Unuavice mi pensas pri Haupenthal, Silfer kaj Camacho, kies ĉi-rilataj verkaĵoj apartenas al la plej legindaj de tiu ĝenro.

‚Pozitivismo' en kritikado

Ĉiuj kolegoj kiujn mi demandis pri la punkto kiel kritiko estu esprimata, respondis, ke kritikon necesus esprimi per afablaj, ĝentilaj vortoj, ĉar plej ofte temas pri volontuloj, al kiu tiu kritiko eventuale estas direktata. Volontuloj mem principe ne meritas (negativan) kritikon, sed laŭdon kaj subtenon. Ĉar ni estas amatoroj, ni malmulte scias ekzemple pri publikaj rilatoj kaj similaj profesiaj terenoj. Sekve, se ni volas kritiki aliajn homojn kaj iliajn agadojn, ni devas tion fari tre delikate kaj tre kompreneme. Rektaj alfrontaj atakoj malofte utilas aŭ sukcesas, ĉar ili ne lasas sekan teron sur kiu la atakato povus daŭre staradi. Gravas, ke la kritikito povu ‚gardi sian vizaĝon', kiel diras germanligvanoj. La personoj, kies agoj estas kritikataj, ricevu la impreson, ke la kritikanto opinias ilin kapablaj ĝustigi sian agadlinion kaj ne pensu, ke ili estas tute nekuraceblaj, kiel klarigis aktivulo el Hindio (Barato).
Fakte, kritiko en si mem ne estas io negativa, sed ofte oni perceptas ĝin tia. Sed kion fari, se nek la ĝentilaj vortoj, nek la pozitiva, nek konstrua aŭ seke-serioza kritiko, nek la ceteraj metodoj helpas kaj utilas ? Kaj kion fari, se ne eblas demisiigi fuŝulon, kiel en la profesieca vivo, despli ĉar anstataŭanto apenaŭ troveblas, kiu laborus je la samaj (honoroficaj) kondiĉoj ? Ĉi tiun dilemon ni ofte renkontas en la Esperanto-movado.
En medio kiel la esperantista ofte validas la principo, ke homoj ja deziras kritikon, sed nur tiun, kiu plaĉas al ili, kiel skribis iu samideano el Francio. Ke homoj ĝenerale tro malofte akceptas kritikon ad rem kiel kritikon ad hominem, estas ŝajne biologie klarigebla kaj pro tio nesurpriza, kiel avertis min ĉi-rilate informita kolego. Mi konas altmeritan esperantiston, kiu funkcias, fakte ĉiam funkciis, dum jardekoj, cetere kun la vasta admirado de la publiko, laŭ jena filozofio: Tiom longe ke mi laboras honorofice, mi faros kion mi volas laŭ mia bontrovo, neniu povas dikti kaj ordoni al mi ion ajn, kaj mi ankaŭ ne estas kritikebla. Ĉi tia sinteno, kiu ebligas la plenan kaj nekontroleblan agliberon, fakte estas absurda kaj povas esti ankaŭ ruiniga, kiel montris praktikaj spertoj kun la filozofio de tiaj aktivuloj.

Diferencoj inter amatora kaj profesia medioj

Konsultita esperantisto kroata, kiu bone konas la diferencon inter komerca kaj honorofica laboro, esprimis pri tiu temo eble pravan vidpunkton kun komprenemo, ke, tamen, oni ja ne povas postuli absolutan profesiecon, se mankas mono en tiaj institucioj por pagi salajron. Ĝuste tia situacio kondukas al diletanteco, indiferenteco kaj senrespondeco, opinias mi.

Ĉu kritiko havas sencon ?

La supraj konsideroj kondukas nin al la demando, ĉu kritiko entute havas sencon kaj efikon en la Esperanto-movado? Rilate al tiu demando ekzistas diverĝaj opinioj. Iuj pli skeptikaj kolegoj kredas, ke kritikado apenaŭ utilas, ĉar ĝi ripetiĝas preskaŭ senefike dum la historio de nia lingvokomunumo (mi mem inklinas al tiu ‚skolo'), pro tio ke rolantoj venadas kaj iradas kaj do re(mis)inventas la radon (sed ne nur en tiaj kazoj). Iuj aliaj opinias, ke tamen jes kritiko povas efiki, en konkreta kazo, kondiĉe ke kritiko estas racia kaj aŭskultata, kaj kiam la koncernatoj devas estas pretaj akcepti kritikon. Denove

aliaj havis miksitajn spertojn kun kritiko. Ili diris, ke sencon ĝi ja havas, efikon nur probable. Polo skribis, ke lia sperto kun kritiko en la Esperanto-movado estas preskaŭ negativa, ĉar ĝis nun la kritikataj personoj kondutis laŭ la onidiro: hundoj bojas. En iu yahoo-grupo la prezidantino de iu landa asocio plendis, ke ŝi jam vane prezentis vidpunktojn senrezulte. Kritiko en la Esperanto-movado ja havas sencon, se ĝi estas zorga kaj konstrua kaj ne nur momenta kraĉo, avertis la konsultito nederlanda. Kiam hinda esperantisto antaŭ multaj jaroj volontulis ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, oni ja konsideris lian draŝan kritikon, kaj parte oni lernis el ĝi, kiel li skribis al mia ĉi-rilata demando.

Laŭ la opinio de sperta esperantisto en Nederlando, kritiko ne estas simpla esprimo de malplaĉo. Kritiko enhavu sintezon, analizon kaj konkludon. La celo de la kritiko ne estas/u malmunti/detrui iun aŭ ion, sed plibonigi ion. Kaj li konfirmis, ke eĉ se unuavide kritiko apektas negative, ĝi estas per si mem (cel)pozitiva, kvankam esceptoj abundas grandkvante.

Sendube: Ne mankas kritiko kaj ideoj. Sed mankas adaptiĝo al la nuna realo, kiel konkludis konsultita kolego el Finnlando. Kaj kun la nederlandano, kiu estas malnova admiranto de Karlo Markso, oni povas postuli laŭ la principo de la ‘senkompromisa kritiko de ĉio ekzistanta senkonsidere pri la objekto de la kritiko’, ke kritiko, eĉ se ĝi estas necese radikala, estonte estos espereble pli aŭdata en la Esperanto-movado. Alikaze tiu movado riskos fariĝi nekritikebla organizo; tio estus tre malbona afero, ĉar historie oni scias kio okazis kun tiaj movadoj.

Labori kaj agadi en Esperantujo do impresas kiel migrado sur la kresto de monto: Inter la tolerado kaj kritikado de misstatoj plej diversspecaj, kaj kun tio bedaŭrinde ankaŭ de ligitaj personoj. Tio estas tre malfacila spagato, ĉar necesas grandega porcio da komprenemo, pacienco, indulgo kaj fortegaj nervoj, se oni ne volas resti indiferenta.

Utilaj komentoj bonvenas, kaj (radikala) kritiko, eĉ kritiko de tiu ĉi kritiko, necesas.

Andreas Künzli (CH)

Publikigita en *Spegulo* 1/2009.